nia voĉo

madrida esperanto-liceo septembro 2022

## INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ JAM ĈEESTAJ

Kiel ni komentis en nia pasinta bulteno, rekomenciĝis la ĉeestaj someraj internaciaj renkontiĝoj, kaj kelkaj madridanoj povis ilin ĝui.

Plej multnombre partoprenis madrid-devenaj aŭ madrid-loĝantaj samideanoj en la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis en Nederlando, inter la 20a kaj la 27a de aŭgusto en De Roerdomp – Westelbeers, Nederlando (depende de la maniero kalkuli eĉ 7; en apuda foto, aperas kvar el ili).



Preskaŭ 250 partoprenantoj el 30 landoj ĝuis diversan kaj tre amuzan renkontiĝon kun koncertoj, ekskursoj, konferencoj, atelieroj kaj speciala adiaŭa muzikalo kun altkvalita muziko ("June kaj kune", preparita de la partoprenantoj mem dum la tuta renkontiĝo). Ankaŭ estis organizitaj du seminarioj, unu el ili pri lingvoj por demokratio, pri kiu zorgis la hispanoj Carlos Pesquera kaj Manu Guaroa.

Post tri jaroj sen okazigi la kongreson pro la COVID-pandemio, estis klare, ke homoj vere avidas partopreni (por 25 procentoj de la partoprenantoj tiu estis ilia unua internacia renkontiĝo). Resume, mirinda okazo sperti Esperantujon de interne, paroli senhalte la internacian lingvon kaj fari multegajn amikojn. Venontjare la evento estos en Italio, ne maltrafu ĝin.

## NOVA PREZIDANTO DE TEJO, MADRIDA

Loĝanto de Madrido fariĝis la nova prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)!

En voĉdono en monato julio, la filipin-devena esperantisto Albert Stalin Garrido, de kelkaj monatoj loĝanta en Madrido, estis elektita prezidanto de TEJO por la mandato 2022-2023. Ni gratulas lin!

## BELARTAJ KONKURSOJ ANONCITAJ DUM UK

Dum la 107-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en somero en Montrealo, estis anoncitaj la rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2022. Miguel Fernández legas la liston de premiitaj verkoj kaj aŭtoroj en 2022 en la adreso: https://youtu.be/sALpS16S-Ck.

La dua premio en la branĉo mikronovelo estis aljuĝita al la madrida samideano Francisco Javier Moleón pro la verko "La bela kaj la bestio".

## NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO




Jam anonciĝis la novaj kursoj de Esperanto en la Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED), denove en niveloj A2 kaj B1. La periodo de enskribiĝo komenciĝas la 13an de septembro. Vi povas koni la detalojn en la retejo http://www.cuid.uned.es.

Ankaŭ virtuale okazos la kursoj de la kolombia asocio, kiuj tre sukcesis pasintjare. La lecionoj disvolviĝos merkrede kaj sabate, kaj oni anoncis grupojn por komencantoj kaj por progresantoj. La enskribiĝo devas esti farita antaŭ la 17a de septembro. Vidu la detalojn ĉe: https://esperanto.co/cursos/c22/.

Baldaŭ komenciĝos ankaŭ la kursoj ĉeestaj, en la sidejoj de la grupoj de Madrido kaj Fuenlabrado, sed oni ankoraŭ ne fiksis la detalojn. Se vi interesiĝas, skribu al la retadreso de madrid@esperanto.es, kaj oni provos pretigi grupon.

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

Kiel estis antaŭvidite, pluraj esperantistoj vizitis Madridon dum la someraj monatoj, kaj kelkaj rendevuis kun amikoj en la urbo. Inter ili menciindas Julian, filipina-usona esperantisto, kiu vizitis la sidejon kaj kunmanĝis kun amika grupo. Ankaŭ vizitis nin en aŭgusto,



unue juna usonano Mac Bardayan por viza afero en Madrido; lin gastigis kaj ĉiĉeronis tra Madrido Andy, kiu poste ricevis la viziton de kub-germana paro Geomar kaj Ĵenja (denaskulino) kiujn li same gastigis hejme kaj ĉiĉeronis por ili.

Meze de septembro estas antaŭvidata la vizito de familio de polaj esperantistoj, kiuj gastos en Madrido dum kelkaj tagoj. Ni anoncos la detalojn en la kutimaj retejoj, do estu atenta se vi deziras esperantumi kun ili aŭ kun aliaj eventualaj vizitantoj.

## SABATA RENDEVUO

La kutima unuasabata rendevuo okazos la 3an de septembro, denove en la trinkejo O Miño, strato Esperanto, 2 (metrohaltejo Alsacia), ekde la 18,30. Aliro kaj babiltemoj estas liberaj. Pliajn detalojn: https://eventaservo.org/e/cffca5.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo
Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid
Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo
http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es
Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com